



Informoj:
Arto -:- Literaturo
Turismo -:- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

GRAMATIKAJ KLARIGOJ

II

Post la difinoj faritaj en la unua parto de tiu ĉi verkaĵo de adverbo, prepozicio kaj konjunkcio mi montru nur praktike la trafan manieron distingi en Esperanto tiujn ĉefajn vortojn. La prepozicio karakteriziĝas ĝenerale, ĉar post ĝin oni povas meti simplan substantivon. Ekz.: «Jozefo kantis anstataŭ Karolo». Tie ĉi: «anstataŭ» estas prepozicio, ĉar ĝi antaŭiras «Karolon». Se la vorto estas sola, sen postiranta substantivo, ĝi estas adverbo. Ekzemple: «Li iris for»: «for» estas adverbo, ĉar ĝi estas sen postmetita substantivo.

Kiam radiko estas pure prepozicia kaj oni uzas ĝin sen postiranta substantivo, oni devas aldoni al ĝi finaĵon -e, kiu karakterizas la esperantajn adverbojn. Ekz.: «Kontraŭ la domo staras arbo.» Tie ĉi, «kontraŭ» estas prepozicio, ĉar ĝin sekvas substantiva «domo», sed: «La arbo staras kontraŭe», tie ĉi «kontraŭe» estas adverbo, ĉar ne estas postmetita substantivo kaj oni ne povas diri: «La arbo staras KONTRAŭ».

La konjunkcion oni distingas, ĉar ĝi kunligas du propoziciojn, tio estas, du amasvortoj ĉe kiuj estas verbo kun persona finaĵo. Ekz.: «Li venis, por ke mi raportu al li pri la afero». Tie ĉi «por-ke» estas konjunkcio: atentu, ke estas du verboj kun persona finaĵo: «venis» kaj «raportu». Sed en la esprimo: «Li venis por helpi al mi», «por» prepozicio, ĉar ĝi antaŭiras verbon sen persona finaĵo (helpi, infinitivo) kaj la esprimo gramatike

egalvaloras la sekvantan; «li venis por mia helpado», kaj oni klare vidas, ke «por» estas prepozicio antaŭirante la substantivon: «helpado».

Kelkafoje la sama vorto povas esti en unu propozicio konjunkcio kaj en alia adverbo aŭ prepozicio. Ekz.: «Dum la mateno mi promenas». Tie ĉi «dum» estas prepozicio, ĉar ĝin sekvas substantivo «mateno». Sed se ni diras: «Dum li promenas, mi skribas», tie ĉi «dum» estas konjunkcio, kiu kunligas du propoziciojn (estas du verboj kun persona finaĵo: «promenas» kaj «skribas»).


En la propozicio: «kiam li venis?», «kiam» estas adverbo rilatanta al verbo «venis», sed en: «mi venis, kiam li mortis», «kiam» estas konjunkcio kunliganta la du propoziciojn; «mi venis, li mortis».

Post tiuj konsideroj ŝajnas al mi, ke la legantoj plej bone distingos kiaj vortoj estas adverboj, prepozicioj kaj konjunkcioj, sed por ĝuste respondi, ĉu ia vorto estas prepozicio aŭ adverbo aŭ konjunkcio estas necese, ke oni montru la frazon en kiu ĝi estas metita aŭ uzita, ĉar, kiel mi pruvis, unu sama vorto povas havi malsamajn gramatikajn oficojn.

En la frazo: «se li ne amas min!, li almenaŭ min salutis», «almenaŭ

estas adverbo, rilatanta al verbo «salutis». En: «krom la vero nenio estas eterna», «krom» estas prepozicio, ĉar ĝi antaŭiros substantivon «vero». En la frazo: «malgraŭ, ke ŝi estas bela, mi ne amas ŝin», «malgraŭ-ke» estas konjunkcio kunliganta du propoziciojn: «ŝi estas bela, mi ne amas ŝin». Sed en: «malgraŭ ŝia beleco mi ne amas ŝin», estas nur unu verbo (amas) kaj unu propozi-

TURISMO



—Ĉi tie estas kie oni konstruis, antaŭ multaj centjaroj, la Babelan Turon.

—Kaj kial oni detruis ĝin?

—Ĉar la laboristoj, kiuj konstruis la turon ne sciis Esperanton.

Karikaturo de CHAS.

cio, kaj «malgraŭ» estas prepozicio, ĉar ĝi antaŭiras la substantivon «beleco».

Ĉiuj legantoj plej bone komprenos, ke mi nur celas prezenti en tiu ĉi artikoleto praktikajn regulojn kaj ĝeneralajn okazojn. La scienca esploro de la demando, laŭ gramatika vidpunkto, kaj konsiderante ĉiujn apartajn okazojn kaj esceptojn postulus longan spacon. Se la legantoj, tamen, trovus per miaj klarigoj seneraran gvidilon por korekte sin eltiri el la embarasaj punktoj, mi estus plej feliĉa kaj mia artikoleto ne estus tute vana.

VICENTE INGLADA.

NUR POR GEFRAŬLOJ

Fraŭlo, fraŭlino, ĉu vi volas scii ĉu via fianĉino aŭ fianĉo vere amas vin?

La homoj dum la nuna epoko estas vere mensesemaj, tial ni ne devas miri ke iu fianĉo diras varmpasie al sia fianĉino. «Se vi min ne amas mi mortos pro ĉagreno».

Kaj post kiam ili edziĝis tiujn samajn vortojn ili diras al aliaj virinoj.

Per tio ĉi oni komprenas ke amo ne ludis rolon en tiu geedziĝo; almenaŭ en la viro.

Sed Esperanto kiu alvenis en la mondon nur por plibonigi homaĵojn donas al ni la solvon por tiu ĉi grava afero.

Iu fraŭlino kiu vere sentis la esperantan amon en sia koro lernigas nin kiamaniere ni devas agi.

Ŝi deziris esperantigi sian fianĉon sed li, ne nur ne volis lerni Esperanton sed eĉ ne konsentis ke ŝi estu esperantista.

Plie ŝi ne estis certa ĉu li amis ŝin aŭ ne, kaj ian tagon demandis: —Kiam vi eklernos Esperanton?

—Neniam; li respondis, kaj ankaŭ mi ne volas ke vi iru plu en la klubon, vi ne nur parolas kun fraŭlinoj kaj mi estas ĵaluza.

—Kial vi estas ĵaluza, ĉu mi faras motivon?

Mi devas paroli kun ĉiuj ĝesamideoj por ekzerci paroladon pri mia amata esperanta lingvo, lernu vi esperanton kaj tiam mi parolos kun vi.

—Mi estas certa ke vi ne faras motivon por ke mi estu ĵaluza sed mi tute malamas Esperanton kaj multege vin mi amas, tial mi estas ĵaluza.

—Esti ĵaluza ne estas pruvo de amo, nur estas egoisma pruvo.

—Do, petu al mi tiun pruvon kiun vi volos por ke mi povu rimarkigi al vi mian amon.

—Lernu esperanton!

—Mi ne povas, mi ĝin malamas.

—Kiu malamas Esperanton malamas min, iru malproksimen!

Tiu ĉi fraŭlino, nun estas kontentega ĉar dank' al Esperanto ŝi povis kompreni ke tiu ĉi viro ne amis ŝin, ĉar se li ŝin amus li lernus Esperanton. Ĝesamideoj, esperantigu viajn ĝefianĉojn! Esperanta geedziĝo estas la plej ĉarma feliĉaĵo.

VERDSTELULINO.

MALNOVAJ PAGOJ

«BIRDOJ MIGRANTAJ»

(El E. J. Stagnelius, glora sveda poeto).

Al fremda la bordo

Ĝemanta birdar'

Vojaĝas de l' nordo

For super la mar'.

Kun vento disiras

Malgaje la kri':

«Ho kien nin tiras

L' ordono de Vi?»

Flugila l' ar' tiel vokadas al Di'.

«De landoj malriĉaj

Ni flugas kun tim',

Ĉar tie feliĉaj

Ni estis sen lim'.

Ni neston konstruis

En verda arbkron'

Ĝin bele trabuis

Venteta la son'.

Ni flugas nun al malkonat'-region'.

La nokto somera

Kun rozoj en har'

Sidadis espera

En verda l' arbar'.

Ni ne endormiĝis

Dum nokta la hor',

Ni nur sensentiĝis

En flora l' odor'.

Ĝis vekis nin sun' per radioj de or'.

Arkajon portadis

L' arbar' super ni.

Rosperloj bruladis

Sur flora foli'

Sed nun ekflaviĝas

La bela arbar'.

La vent' plifortiĝas

Denove sur mar'.

Kovrita de prujn' estas kampa florar'.

Pro kio ni restas

En nordo plu nun?

Malhelaj jam estas

Radioj de l' sun'.

For estas somero,

El tomb' flugas ni

Sen plend' tra l' aero

Preĝantaj al Di'.

Vin, marojn bruantajn, salutas nun ni.

Ĝin kantas birdaro

Ĉe l' bruoj de ond'

Kaj venas trans maro

Al pli bela mond'.

Kaj tie sonoras

La bru' de l' river'

Eterne, kaj floras

Eterne la ter'.

La boskoj kantadas pri ĝu' kaj esper'.

Ho kiam eniĝas
En vivon dolor',
Kaj jam aŭtuniĝas,
Ne ploru, ho kor'.
Ne plendu la sorton,
Ĝi venas de Di!
Ne timu la morton,
Land' kuŝas trans ĝi.
Lumita eterne de suna radi'!

SIG. AG...

El «Lingvo Internacia», n-ro 12, decembro, 1896.

NI HAVOS NOVAJN ESP. VORTAROJN!!!

Unue dankon al S-roj Anguita, López, Rubio, Capdevila, Martínez, Piñó k. c, kiuj sendis helpon kaj sugestojn por la eldono de novaj vortaroj. Tio elpruvas ke nia alvoko publikigita sur la oktobra numero de NIA VIVO komencas fruktdoni. Sed ni forlasu vortojn.

S-ro Inglada, krom aliaj, ricevis du promesojn po 500 ptj. Do, ni, baldaŭ, havos la unuan parton de niaj deziritaj vortaroj; t. e. : vortaro esper-hisp. kun oficialaj radikoj. La cetero (esp.-hisp kun neoficialaj radikoj kaj hisp.-esper) estos «kiam ni ĉiuj hispan-amerikaj esperantistoj volos». Helpu, karegaj samideanoj! La graveco de la afero meritas plej efikan helpon!!

Vidu kion diras al ni iu amiko:

«Krei akcian societeton kiu financiĝus parton de la eldono de la vortaro, kaj kiu samtempe havus specialan kontrakton kun la eldonisto, kiu estus devigata redoni la pruntedonitan kapitalon post la elvendigo de certa nombro da vortaroj. Sed la plej urĝa afero estas havi la vortaron tute elpretigita. Kun la tuta manuskripto de la vortaro sur la mano estas pli facile trovi monon ol sen ĝi. Tiamaniere la persono kiu pruntedonas kelkan monon scias ke post 4 aŭ 6 monatoj la libro estos presigata kaj sur liaj manoj.»

Jen nova plano. Pensu pri ĝi. Sciuj ankaŭ ke la manuskripto estas pretigita. Pensu, sed ankaŭ volu havi plej eble baldaŭ la novajn vortarojn. Ni atendas vin.

FRATECO.

LETEROJ DE NEDERLANDO

La sekigo de la Zuiderzee (Suda maro)

Ĉiu ajn kiu estas leginta aŭ aŭdis iom pri tiu grava entrepreno, sendube ne estas povinta premi sian fantazion en la limoj de la realeco kaj sia menso flugis super la fantazian landon de grandeguloj, priskribita de Dean Swift. Tiel grava estas la sekigo de la Zuiderzee, ke ŝajnas entrepreno nur por gigantoj, pro la grandega kuraĝo necesa por kontraŭbatali la plej teruran elementon: la Maro, submetante ĝin kaj altrudante ĝin

recedi, trudante al ĝi novan potencon limon kontraŭ kiu estu neutilaj ĝiaj klopodoj por antaŭeniri. Tio kio ŝajnas nekredebla, estas nun fakto. De nove privilegia raso estas montrinta sian historian obstinecon, intelekton kaj kuraĝon, plenumante kun sukceso tiel gravan entreprenon.

Zuiderzee, estis la nomo, en tiu lasta tempo, de la plej grava golfo el la Norda maro, en Nederlanda marbordo, limigita per la Nord-Holandaj provincoj Utrecht, Gelderland, Overijssel, Friesland, kaj per la insuloj Texel, Vlieland. Tercheling kaj Ameland. Ĝia etendo estis 3.139 kvadrataj metroj, kaj sur ĝi la insuloj Wieringen, Schokland, Urk kaj Marken. La Zuiderzee estis nomata antikve «Flavo» kaj tiam estis fermita lago, nomata poste «Middelge» kies Nord-okcidentan parton englutis la ondoj je la komenco de la XIII^a jarcento. La antaŭenirado de la maro donis pli kaj pli da etendo al la lago, kiu atingis sian plej grandan amplekson dum la XIV^a jarcento. Poste la profundeco malpliigis, kaj tio malebligis la navigacion por la grandaj ŝipoj, kies grandeco estis pliigonta je la komenco de la XIX^a jarcento. De tiam komenciĝis vasta fiŝkaptado en la Zuiderzee, laborante multenombraj fiŝkaptistoj kun grava ŝipetaro. Post kelkaj jaroj jam aperis la ideo por la fermigo de la Zuidermee per granda digo, pretigonta por la sekigo, pripensante la vastan supraĵon de tero kies kulturado riĉigis Nederlandon. La inĝeniero Van Diggelen estis la unua persono kiu atentis pri tiu grava problemo, kaj la registaro petis al li detalan planon en la jaro 1849. Poste, kreskis la nombro da entuziasmoj por tiu ideo; ideo kompreneble kontraŭ kiu batalis la fiŝkaptistaro kiu loĝas en Marken, Volledam, Edam kaj Urk, dirante ke ili perdus sian vivmanieron. La antaŭuloj kiuj, fine, estas atingintaj sian celon, ĉiam opiniis ke la fiŝkaptistoj povus kulturi la sekigitajn kampojn kaj vivi pli bone. La ideo disvastiĝis dank'al du homoj, la deputito Buma kaj P. J. A. van Diggelen, kaj post forigado de kelkaj projektoj pro la vasteco kaj multekosta plenumado, inter ĉiuj el ili oni eliris novajn planojn kiuj estis fine aprobitaj en la printempo de 1894.

Laŭ tiu projekto, oni devis konstrui longan digon, de la «polder'o» («polder» = Holanda vorto kiu nomigas parton da tero antaŭe kovrita de la maro) Anna Paŭlovna ĝis Piaam en la okcidenta marbordo de Frisia, trapasante la insulon Wieringen. Tiel la Zuiderzee restus fermita. En ĝia interno estus sekigitaj kvar teritorioj defenditaj per kvar digoj. La unua inter Wieringen kaj la Medemblick'a marbordo; alia de la suda parto de Enkhuizen ĝis la insulo Marken; la tria, de Muiderberg ĝis Keteldiep; kaj laste, alia de la Lemmer ĝis Blokzijl trapasante la insulojn Urk

kaj Schokland. Plenumante tion oni kaptas al la maro vastan teritorion, tre valoran pro la kosto de la tero en Nederlando. Tiel la Zuiderzee transformiĝas je interna lago.

En la jaro 1918 komenciĝis la konstruado de la fermdigo kaj post konstruo de du kilometroj kaj duono, oni haltigis la laboron ĝis 1926. Tiam komenciĝis la vera laboro. Por la konstruo de la digo estis uzata, unue argilo kiu estas ŝutita ĝis unu metro sub la akvo kaj tiel formas la eksteran flankon de la diga korpo; kiam tiu ĉi digo estas preta, oni konstruas sur la interna flanko la sablan parton de la digo; poste, oni kovras ĉi tiun sablan digon per argila tavolo kiu estas unu metron dika kaj sur tiu argila tavolo venas la vera digo super la akvo. Tre multekosta estas la konstruado se oni atentis, precipe, ke la ŝtonegojn kiuj kovras la eksteran flankon de la digo oni alportas el Germanujo kaj Belgujo, ĉar ne ekzistas ŝtonoj en Nederlando.

Antaŭ nelonge finiĝis la plej grava tasko, tio estas, la fermigo de la granda digo de 39.625 metroj. Nun la nomo de la Zuiderzee estas «Ysselmeer» (Ejsel = lago). Jam estas kulturitaj grandaj partoj el la sekigita tero. Preskaŭ 3000 hektaroj da tero estas semitaj, kaj grandparte estas provkampoj por konstati kion oni povas akiri el tiu ĉi grundo.

La priskribo detala de la kosto, disvolviĝo kaj profito el tiu entrepreno kaj de la diversaj kanaloj, kluzoj kaj fervojoj aldonaj, plenigus multajn paĝojn, kion bedaŭrinde malpermesas nia malgranda bulteno. Ni diros nur ke por la konstruo de la fermdigo oni bezonis 80 trenboatojn, 12 dragmaŝinojn, 6 prempisboatojn, 4 terpisboatojn, 6 grandajn gruojn, 10 malgrandajn gruojn kaj ankoraŭ multe da alia materialo. Dum tiu tempo laboris tie 3.000 laboristoj direktataj de sufiĉa nombro da inĝenieroj. Kiel mi diris, la ĉeftasko estas atingita kun granda sukceso, kaj tie kie antaŭ mallonga tempo ankoraŭ estis maro, grandparte estas kulturitaj kampoj kaj oni povas vidi kampaŝtejojn kie paŝtas sin granda nombro da bovinoj, ŝafoj k. t. p.

La detalojn por tiu artikolo, mi ricevis de samideano Em. Polak, el Amsterdamo, mia korespondanto kaj estimata amiko. Mi plezurege ilin publikigas kaj mi atentis samtempe pri la ekzemplo kiun donas al la Mondo, Nederlando, aligante pace novajn teritoriojn por kio ĝi uzas, noble, monon, intelekton kaj volon. Tiel devus agi aliaj landoj kiuj post suferado de la ĉagrenoj el la milito, ankoraŭ direktas la klopodojn de la intelekto al la preparado kaj disvolviĝo de novaj kaj teruraj malfeliĉoj... ankaŭ por akiri pli da tero.

F. TURRIÓN.

Grava katastrofo en la Valencia Universitato

Sub tiu ĉi titolo Grupo Esperantista Valencia publikigis tre belan folion kun alvoko al la tutmonda esperantistaro.

Valencia Universitato, konstruita je la XV^a jarcento, unu el la plej famaj kaj historiaj el Hispanujo, brulis en la 12^a tago de majo de la nuna jaro, kaj la pli granda parto de la antikva konstruaĵo detruigis. La Observatorio kaj Fakultato de Sciencoj estis tute detruita.

Estas nepre necese refari la kolekton de la Naturscienca Muzeo, por tio estas necese ĉio, mineraloj kaj precipe fosilioj kaj konkajoj.

La Profesoroj kaj studentoj faris varmegan alvokon al la bonfarantoj por ke ili alportu al la Naturscienca Muzeo la kiel eble plej multenombrajn mineralojn, konkajojn kaj fosiliajn ekzemplerojn.

La valenciaj esperantistoj ekkomprenis ke la tuta esperantistaro aŭskultu tiun krion de doloro, kaj petas de la Delegitoj de U. E. A. kaj de la sciencamantoj esperantistoj por ke ili helpu je la malfacila penado.

Vi devas fari nacilingve la saman alvokon al viaj sampatrujanoj, klarigante al ili ke ĝi estas altruisma kaj reciproka, ĉar per Esperanto la homa familio povas efektiviĝi la sole veran solvon de sincera solidareco.

La Valencia Esperanta Grupo estas preta plenumi la devon montrata en la 67^a artikolo de la U. E. A. statuto, tio estas, pagi siatempe la elspezojn kaŭzitaj al niaj kolegoj okaze de la plenumado de tiu servo.

La Valencia Universitato sendos dankleteron oficiale al ĉiuj donacintoj.

Oni petas al la sendontoj de iu ajn materialo, mineraloj aŭ fosilioj, ke ili bonvolu skribi klare, prefere per maŝino, ne nur la klasikan nomon de la specimena mineralo, fosilio aŭ konkajo, sed la precizan lokon kaj terenon kie ĝi estis trovita, la profundajon kaj ĉiujn rimarkindajn cirkonstancojn.

La rezulton de viaj klopodoj ĉirkaŭ Muzeoj, profesoroj aŭ privataj sciencamantoj kiuj estos pretaj donaci ekzemplerojn vi povas komuniki al jena adreso:

Valencia Esperanta Grupo Sangre 1-Valencia (Hispanujo).

KRISTNASKA LOTERIO

Número 6.174

Oni komencis disdoni kristnaskan loterion; oni rememoras al la gefratecantoj ke ili povas aĉeti ĝin al S-ro Larruga, strato Convertidos, 9, presejo, dum la tuta tago, kaj ankaŭ en nia klubo, de la oka kaj duono ĝis la naŭa vespere, sciigante ke nur estos aĉetebla ĝis la 10^{an} Decembro.

Presejo F. Martínez - Strato Audiencia, 3-5 - Zaragoza (Hispanujo)